# ESPERANTO EN MARCHE

## Flandraj kaj valonaj esperantistoj kunlaboras



### ni faris
EŬROPA KONGRESO EN STRASBURGO

### ni faras
KURSO EN HUY

### ni faros
KURSOJ EN ALIAJ VALONAJ URBOJ
ESPERANTO-FESTO EN LIEĜO
ZAMENHOF-FESTO EN LESSINES

esperanto Wallonie

**Revue trimestrielle belge**

ÉTÉ 2024 - N°2

# Informations
# Informoj

L'asbl Espéranto Wallonie (anciennement APE) a pour objet la diffusion de l'espéranto, langue auxiliaire internationale, conçue dans le but de faciliter la communication entre locuteurs de langues maternelles différentes.
La V.Esp-o (Espéranto Wallonie) agit en Wallonie directement ou en soutenant les groupes locaux, les tables de conversation et toute initiative individuelle, avec le support de la FWB.
Ses principales activités sont l'organisation d'événements et de formations, la participation à des festivals, le support des Verdaj Skoltoj, des groupes locaux et des tables de conversation.

## Comment soutenir nos actions ?

- Participez à nos événements
- Contribuez à cette revue
- Rejoignez notre équipe
- Devenez membre
- Offrez-nous un café via un don mensuel de 3 € ou plus sur notre compte avec la mention « don »

**Avec le soutien de** FÉDÉRATION WALLONIE-BRUXELLES

## Devenir membre / Membriĝi

**MEM** (membre > 25 ans + revue) 25 €
**JUN** (membre < 25 ans + revue) 12 €
**FAM** (cohabitant pas de revue) 5 €
**REV** (abonnement revue seule) 12 €
À payer sur le compte d'Espéranto Wallonie **BE33 5230 8132 1946** avec les mentions correspondantes. Voir sur le site www.esperanto-wallonie.be
E-mail : esperanto.wallonie@gmail.com

## Nos partenaires / Niaj partneroj

- International : Universala Esperanto Asocio (UEA) Rotterdam et SAT (Paris). Point de contact, Claude GLADY : 071 644 916 cglady@arcadis.be
- Belgique : Belga Esperantista Federacio (BEF). La coupole du mouvement. www.esperanto.be/bef Kristin TYTGAT: 03 322 80 70 kristin.tytgat@skynet.be
- Flandre : Flandra Esperanto-Ligo (FEL) 03 234 34 00 www.esperanto.be info@fel.esperanto.be
- Bruxelles : Esperantista Brusela Grupo (EBG). Nikolao de BUYL : nikolao@esperantobruselo.org 0478 382 981 www.esperantobruselo.org
- Verviers (Senlime) : Jean-Marie JACQUES 087 330 292 jacques@senlime.org
- Jeunes : Verdaj Skoltoj, asbl. Scoutisme sans frontières en espéranto. info@verdajskoltoj.net Valère DOUMONT 0485 517 552 www.verdajskoltoj.net

## Contenu / **Enhavo**


Nia planita agado - 4
La Beneluksa Kongreso - 5
La Eŭropa Kongreso - 7
Kajto: sen timo - 9
Novaĵoj el Esperantujo - 10
EO-festo en Lieĝo - 12
Esperanto en Afriko - 13
Divideblecaj kriterioj - 14
Esperanto en Flandrio - 16
Dezertoj de Armel Amiot - 17
Krucvortenigmo - 18



### Colofon / **Kolofono**

Ce magazine est édité par l'asbl Espéranto Wallonie - Rue de la Terre Franche, 33 - 5310 Longchamps.
Rédacteur en chef : Jean Annet
Rédaction et mise en page : Yves Nevelsteen
Imprimé par Lebrun Communications à Strée




# Éditorial
# **Antaŭparolo**

La Belgique est un drôle de pays. On le savait déjà par notre répartition politique particulière, mais dans le monde de l'espéranto, elle fait figure de singularité puisque qu'il n'y a pas qu'une seule association nationale d'espéranto mais 4. La flamande (FEL), la wallonne (V.Esp-o), la bruxelloise (EBG) et BEF (la Belga Esperantista Federacio) qui représente officiellement la Belgique au niveau de l'UEA. Cette particularité linguistique et culturelle qui nous a divisé pendant de nombreuses années nous met également au défi de mettre à jour le vrai projet espérantiste : celui d'unir les peuples grâce à une seule langue.

Les espérantistes belges n'auraient-ils pas une carte à jouer dans notre monde divisé pour montrer qu'un projet commun de s'entendre, de s'unir et d'agir ensemble est possible ?

C'est ainsi que s'est réuni dernièrement de manière informelle des représentants de FEL et de V.Esp-o (notre photo en couverture) pour envisager ce que nous pourrions faire les uns avec les autres, intensifier nos relations et revivifier nos associations avec un projet qui soit de plus en plus commun.

Cette rencontre était déjà une première. Elle fut constructive, elle fut chaleureuse, elle fut espérantiste. Gageons qu'elle soit le début d'une nouvelle ère espérantiste en Belgique.

*Jean ANNET*

# Nos prochaines activités

# Nia planita agado

**ASSEMBLEE GENERALE**

La prochaine AG de la V.Esp-o aura lieu pendant le prochain Beneluksa Kongreso à Hasselt. La réunion se fera le dimanche 22 septembre à 10H. Cette AG est importante parce qu'elle renouvelle les membres de l'OA (Organe d'Administration, anciennement le CA). Les membres de l'OA sont désignés par les membres effectifs de l'ASBL.

Nous mettrons à jour cette liste des membres et nous accepterons de nouveaux membres. Afin de renouveler et de dynamiser notre association, toute personne membre adhérente de l'ASBL peut devenir membre effectif, sur simple demande adressée au président (esperanto.wallonie@gmail.com). Nous encourageons toutes celles et ceux qui souhaitent faire la promotion de l'Espéranto en Wallonie de se présenter comme membre effectif. L'ordre du jour sera envoyé par email. Nous y parlerons 'prospections' et 'intensifications de nos relations avec les associations flamande et bruxelloise'.

Nous invitons tous les membres à participer à cette AG soit en présentiel, soit en vous connectant en ligne si vous ne pouvez nous rejoindre à Hasselt. Bienvenue à toutes et à tous.

**NOS PROCHAINS COURS** à partir de septembre.

Cette année plusieurs nouveaux cours vont se donner dans plusieurs villes:

- à COUVIN, Guy GEUVENS donne un cours d'Espéranto à la Maison des Jeunes
- à SERAING, Eric NEMES donnera un nouveau cours pour les komencantoj
- à NAMUR, Jean ANNET donnera un cours d'Espéranto toutes les semaines le vendredi à 13h30 dans le cadre de l'UTAN (Université Tous Ages de Namur)
- à HUY, le cours de 2è et 3è année reprend tous les 15 jours en présentiel à l'UTD (Université du Temps Libre)

**ZAMFESTO** le 14 décembre, voir page 19.

Pour toute info, contactez-nous :

esperanto.wallonie@gmail.com

# Le congrès du Bénélux

# La Beneluksa Kongreso en Hasselt

La ĉi-jara Beneluksa Kongreso okazos en Hasselt de la 20-a ĝis la 22-a de septembro, organizata de la Limburga Esperanto asocio. La loĝejo estas Hostel H, tuj malantaŭ la stacidomo de Hasselt. En ĉi tiu retejo vi povas jam konatiĝi kun Hasselt: **https://www.visithasselt.be/fr**




Provizora programo:

**Vendrede**

- Vizito al la Japana ĝardeno
- Koncerto de Jonny M

**Sabate**

- Kunsido de la Belga Esperanto-Federacio
- Kurso por komencantoj
- Prelego: Esperanto en Limburgo
- Muzikateliero
- Promenado tra Hasselt + Ĵenevromuzeo
- Komuna sportado
- Tabloludoj
- Teatraĵo de Arno Lagrange

**Dimanĉe**

- Ĝenerala kunveno de la Valona Esperanto-Asocio
- Kurso por komencantoj
- Kurso por progresintoj
- Muzikateliero
- Bicikla ekskurso
- Vizito al la Esperanto-arkivejo en Diest

Bonvenon! **https://beneluksо.eu/kongreso**


SEMAINE EUROPÉENNE
DE L'ESPÉRANTO
Strasbourg • 6 au 12 mai 2024
Découvrez la langue
internationale
équitable !
Dialogo inter eŭropaj popoloj, portanta de paco
Eŭropa
Esperanto-
Kongreso
Strasburgo
2024
ESPERANTO


Oficiala
malfermo
de la
kongreso
Eŭropa Esperanto-Kongreso

# Le congrès européen à Strasbourg :

## dialogue entre les peuples européens, pour une démarche pacifique! Un grand succès de participation et d'engagement

Les organisateurs pariaient sur 300 participants, nous étions plus de 600 de 30 pays différents. Ce fut une rencontre conviviale et ouverte aux Strasbourgeois grâce à une partie de programmation en français. Chacun·e pouvait choisir parmi plusieurs activités simultanées et les concerts du soir étaient doublés. Je me contente ici de rapporter mes découvertes.

Dès mon arrivée, j'ai assisté à la préparation du Congrès Universel auquel je participerai en août à Arusha, l'occasion aussi de visiter le parc du Serengeti et de s'initier à la culture et à la langue swahili.

Le 9 mai, jour où est célébrée la déclaration de Schuman de 1950 sur la Communauté européenne du charbon et de l'acier, notre inauguration a été très solennelle avec discours en espéranto et animée par la harpe et le chant : Dansons, dansons, partout dans le monde...

L'après-midi, Mireille Grosjean a rappelé à quel point l'Europe (ses institutions et ses peuples) est un mélange coloré et divers. La limite entre l'Europe et l'Asie est arbitraire et peut unir les peuples autant que les diviser. La Russie a une partie asiatique et européenne, tout comme la Turquie. La Géorgie, l'Azerbaïdjan et l'Arménie sont européens par la langue mais asiatiques géographiquement. Il n'y a en fait pas de définition juridique de l'Europe.

Et les institutions ? Le Conseil de l'Europe, dont le siège est à Strasbourg, a été créé en 1949 et compte 46 Etats après l'exclusion de la Russie en 2022. Une réalisation importante du Conseil est le Cadre européen commun de référence pour les langues. L'Union européenne, qui siège à Bruxelles et à Strasbourg, s'élargit régulièrement : de 6 Etats elle est passée à 27 (après le départ du Royaume Uni), et de nombreux Etats sont candidats comme la Turquie et maintenant l'Ukraine. L'AELE/ EFTA est une association européenne de libre-échange qui s'étend à la Suisse, à la Norvège et à l'Islande. Enfin l'OTAN/NATO est l'organisation de défense et elle inclut les USA et le Canada.

Deux ateliers de Kristin Tytgat sur l'Europe et la paix abordaient notamment des questions délicates, comme

de savoir pourquoi de moins en moins de gens vont voter et pourquoi l'éloignement historique de la seconde guerre mondiale ramène des discours belliqueux et de haine. Il est important de comprendre les ressorts de la propagande militaire. Une guerre, ce sont des dirigeants (qui se connaissent) qui décident de détruire des infrastructures et de tuer des militaires et des civils qui eux ne se connaissent pas.

Le vendredi 10 mai, nous avons visité le centre de Strasbourg, la cathédrale, la magnifique horloge astronomique qui défie l'énigme du temps et le musée d'Alsace avec son architecture à colombages typique des années 1600.

Le samedi, après la conférence d'Anne Morelli "De la propagande militaire", j'ai parcouru les 30 panneaux de l'exposition " Résister à la propagande militaire ".

Le dimanche, Sean Ryan parlait de l'UE et de notre proposition d'accélérateur multilingue : utilisons l'espéranto pour améliorer l'apprentissage des langues.

La clôture solennelle fut très intense avec la chanson du groupe Kajto MANIFESTE 'SANS PEUR' sur le droit pour tous les enfants du monde de jouer ! Et pas à la guerre (voir texte page suivante). Tous les membres du Congrès ont repris le refrain en chœur et j'ai pleuré d'émotion. Cette chanson est un résumé si simple de notre expérience européenne...

*Eric NEMES*



# Présentation de l'esperanto au collège Notre-Dame de Gemmenich !

En hommage à l'histoire de Moresnet-Neutre, le collège Notre-dame de Gemmenich a organisé le 16 mai dernier une journée d'immersion culturelle et artistique.

A cette occasion, les 430 élèves du collège, de la 1ère à la 6ème ont remplacé leur journée de cours habituel pour des ateliers de cuisine, peinture, bricolage et découverte de l'esperanto.

Comme le révèle la journaliste France Fouarge (L'Avenir), c'est le principe du Parcours d'Éducation Culturelle et Artistique (PECA) mis en place dans les différents établissements de la Fédération Wallonie-Bruxelles, dans le cadre du Pacte d'Excellence, qui veut offrir une "expérience culturelle complète".

On ne pouvait rendre hommage à Moresnet neutre sans expliquer ce qu'est l'esperanto. C'est ainsi que notre ami Jean-Marie Jacques a présenté l'esperanto à deux ateliers d'une quinzaine de jeunes, le matin et l'après-midi.

Article dans l'Avenir : **https://mallonge.net/Gemmenich24**

# Chanson: un manifeste sans peur
## sur le droit pour chaque enfant du monde de jouer

Dans une ville moyenne, le garçon est né et a vécu. Toujours occupé à jouer, le soleil dans la tête. Et puis le garçon a grandi. Il a entendu parler de soldats et de guerre des histoires sur les armes, sur l'occupation. Le garçon n'a pas compris.

Nous étions libres, mais de la guerre les échos, les ombres, les sombres souvenirs nous pesaient encore. J'ai entendu quelques paroles à propos de la persécution, des interrogatoires, intimidation, torture, meurtre. Ce n'était pas des rumeurs pour moi. C'est ce que j'ai entendu (il était ému). Je n'ai pas compris (il était horrifié)

Merci aux libérateurs, aux gens de la résistance. Le garçon se sentait en sécurité, il vivait insouciant, sans risque en tant que jeune optimiste. Il vivait dans une maison ordinaire, juste construite dans un nouveau quartier, il jouait plutôt dehors toute la journée.

Je me sentais chez moi dans ce quartier. Dans le vent et la pluie, j'ai fait tourner mon cerf-volant, il brillait comme une étoile dans le ciel, mon cerf-volant au vol parfait. Ce calme, j'y pense avec une infinie gratitude. Et alors je dis et je le souhaite vraiment : Laissez les garçons et les filles s'ébattre spontanément, courir et danser, sauter et chanter parce que jouer est un droit pour tous les enfants.

Tout calme (en paix en paix) et vraiment intrépide (sans aucune menace) 4X

**https://mallonge.net/sen-timo**



# Le monde de l’espéranto

## Novaĵoj el Esperantujo

**Unesko-Kuriero: Edukado en la epoko de artefarita intelekto**

«Ekde kiam ChatGPT puŝis generan artefaritan intelekton en la publikan konscion fine de 2022, multaj ĵurnalistoj kaj ministroj pri edukado demandis min: “ĉu komputilaj rimedoj estas bonaj aŭ malbonaj por edukado?”» – skribis Stefania Giannini, vicdirektoro pri edukado de Unesko, en la ĉefartikolo de la lasta (la kvara) pasintjara kajero (oktobro-decembro 2023) de Unesko-Kuriero. Tiu revuo estas estas **senpage elŝutebla** (laŭ la normo PDF) en la retejo de Unesko.

“Edukado en la epoko de artefarita intelekto” estas la ĉefa temo de ĉi tiu eldono. Ĝin traktas interalie jenaj tekstoj en la sekcio “Larĝa angulo”: • Ben Williamson. AI devas esti regata en lernejo • François Hume-Ferkatadji. En Afriko, EdTeknoj popularas • “Mi vidas AI kiel ekstran ilon, sed tre potencan”: Intervjuo kun Sal Khan • Su Peng. En Ĉinio, interretaj iloj por plialtigi la lernadon en malproksimaj lokoj • “La laboro de la instruistoj povus ŝanĝiĝi, sed ni ĉiam bezonos ilin”: Intervjuo kun Stuart J. Russell • Marielle Vitureau. Estonio, frua konvertito al cifereca teknologio • Natalia Páez. En Argentino, algoritmo batalas kontraŭ lernej-forlaso maljusta ĉar ĝi favoras la denaskulojn. **https://mallonge.net/uk-ai**



## Europe Démocratie Espéranto a participé aux élections

Eŭropo Demokratio Esperanto est un mouvement fondé en 2003, dont l'objectif est de défendre la démocratie linguistique en Europe, par la promotion du multilinguisme, de l'intercompréhension et de l'espéranto comme langue commune équitable au côté des langues européennes. Le mouvement se compose d'une fédération européenne dont le siège est à Strasbourg et de sections nationales dans chaque pays.

Europe Démocratie Espéranto (e-d-e.fr) est la section française du mouvement. Ses principaux objectifs sont de promouvoir : 1) La construction de l'Europe du citoyen par l'introduction de l'espéranto comme langue commune équitable en complément des langues européennes. 2) L'initiation à la diversité linguistique à l'école notamment avec l'accélérateur de multilinguisme. 3) Le droit à l'enseignement de toutes les langues européennes au collège et au lycée. 4) Le droit d'étudier et de travailler en français en France. 5) La promotion du multilinguisme et de l'intercompréhension. 6) Le respect du plurilinguisme par les institutions européennes.

Le mouvement a présenté une liste **Espéranto langue commune** aux élections européennes afin de faire connaître l'espéranto au public ! **https://europe2024.fr**

## Matilda aperis en Esperanto



Matilda estas brila infano kun magia menso. Tamen ŝiaj gepatroj opinias ŝin malŝparo de spaco. Kaj ŝia lernejestrino Fraŭlino Trunchull estas malica tirano, kiu opinias, ke ĉiuj infanoj estas putraj kaj aĉaj kaj estu enŝlositaj. Alvenis la tempo, kiam Matilda devas trovi la forton por ŝanĝi sian rakonton, kaj montri, ke infanoj povas esti eksterordinaraj... Verkitan de Roald Dahl kun ilustraĵoj de Quentin Blake, tiun ĉi klasikaĵon tradukis Tobiasz Kubisiowski, kiu gajnis traduk-konkurson starigitan de Esperanto-Asocio de Britio. Ĝin poluris Simon Davies. La libro Matilda estas disponebla ĉe Amazono kaj aliaj tiaj retbutikoj, kun rekomendata prezo £10.

Fonto: https://sezonoj.ru/2024/06/britujo-3/

Saviez-vous que chaque jour est affichée une nouvelle info sur le mouvement espérantiste sur le site https://sezonoj.ru/ ? Il y a aussi un canal Telegram dédié : https://t.me/esperanto_news

# A la découverte de Liège

# Esperanto-festo en Lieĝo 27/7

Ni invitas vin al Lieĝo! Ni = Espéranto-Liège. Vi= ĉiuj esperantistoj kaj krokodilantoj kiuj ilin akompanas ;-).

PROVIZORA PROGRAMO. Ni renkontiĝos en la "Musée de la vie Wallonne" je la 10:15. Vi mem pagos ĝin. Ni manĝos en la restoracio "Le Cloître" je la 12:45. Prezo: 30 €. Ni gvidos vin tra la urbocentro aŭ vi povas viziti ĝin libere de la 14:00 ĝis la 15:30. Eblas

- repreni buson al la stacidomo (atentu la trajnoj inter Liège Guillemin kaj Liège Palais estas anstataŭitaj per busoj)
- aŭ iri per la Mozrivera busŝipo (https://www.navettefluviale.be/) de la "coeur historique" al la ĉefa stacidomo "Liège Guillemins". Prezo: 4 €.

Por manĝi en la restoracio vi nepre devas plenigi la aliĝilon kun via elektita menuo antaŭ la 20a de julio kaj PAGI 30€ sur la konto BE58 5230 8149 0179 de Liège Esperanto.

Amike,

Erik kaj Pierre-Yves

Ĉiuj informoj: **https://eventaservo.org/e/eotago24**

Nous vous invitons à Liège ! Nous = Espéranto-Liège. Vous = tous les espérantistes et les francophones qui les accompagnent ;-).

PROGRAMME PROVISOIRE. Nous nous retrouverons au Musée de la vie Wallonne à 10h15, que vous payerez. Vous payez vous-même. Nous mangerons au restaurant "Le Cloître" à 12h45 au prix de 30 €. Nous vous guiderons à travers le centre-ville ou vous pourrez le visiter vous-même gratuitement de 14h00 à 15h30. Il est possible de prendre un bus pour rentrer à la gare (à noter que les trains entre Liège Guillemin et Liège Palais sont remplacés par des bus) ou prendre le bateau-bus fluvial de la Meuse (https://www.navettefluviale.be/) depuis le "cœur historique" jusqu'à la gare principale "Liège Guillemins". Le prix: 4 €

Pour manger au restaurant vous devez remplir le formulaire d'inscription avec le menu choisi avant le 20 juillet et verser 30 € sur le compte BE58 5230 8149 0179 de Liège Espéranto.

Eric et Pierre-Yves

Toutes infos sur **https://eventaservo.org/e/eotago24**

# Espéranto en Afrique

# Letero de afrika esperantisto

Ni ricevis leteron de nia amiko el Kongo: Honoré Sebuhoro

*Kara amiko,*

*Ĉi tie, kiel novaĵo, estas ankoraŭ la milito daŭranta inter la kongolanda armeo kaj la teroristaj ribelantoj de M23 en nia teritorio Rutshuru, ĝuste 30 km for en la komunumo Kanyabayonga/Rutshuru.*

*Antaŭ 4 tagoj bomboj estis ĵetitaj de Ruando kontraŭ la kongolanda armeo en la Teritorio Nyiragongo apud la urbo Goma, kelkaj kongolandaj militistoj perdis iliajn animojn.*

*Estas zorgo ĉiam resti en ĉi tiu militzono, ni ĉiuj estas agititaj kaj traŭmataj, eĉ la infanoj, kiuj studas en lernejoj, mezletnejoj.*

*Ni esperu kaj ĉiam havu paciencon en ĉi tiu amara situacio por fini.*

*Esperantlingve, ni ĉiam eltenas, membroj lernas la vesperan kurson vacape. La teamo de patrinoj komencas malsukcesi ĉar la nuna situacio ne permesas al ili ĝuste sekvi la Esperanto-kurson. Ĉi tiu milito kaŭzas multe da damaĝo kaj puŝas ideojn malantaŭen.*



*Kiel viaj Esperanto-grupoj evoluas hejme?*

*Ŝajnas, ke vi estos en Universala Kongreso, kiu okazos en Arusha Tanzanio (03-10 aŭgusto 2024).*

*Mi ankaŭ pensas ke mi partoprenos ĉar estos la unua fojo por mi partopreni la kongreson.*

*Mi devas akiri la monon por aĉeti la pasporton de la ĝenerala direktoraro pri migrado en Bukavu sed ĝi estas tro multekosta je 290 USD (inkluzive) transportkostoj.*

*Se miaj klopodoj sukcesos, ni vidos unu la alian dum la universala kongreso post kiam vi ankaŭ estos tie.*

*Dankon kaj bonan tagon!*

*Via amiko Honoré Sebuhoro el DR Kongo.*

Se vi deziras helpi nia amiko partopreni la Kongreson de Arusho, bonvolu fari donacon ĉe la konto de V.Esp-o : BE33 5230 8132 1946. Ni sendos al li vian monon.

# Divideblecaj kriterioj

En tiu ĉi teksto, ni nur konsideros la naturajn pozitivajn nombrojn (entjerojn). Unue, necesas memorigi ke entjera nombro N estas prima se ĝi estas dividebla nur per 1 kaj N. 2,3,5,7,11,13,17,19, 23, 29, 31, 37 estas la unuaj primnombroj. 24 ne estas prima ĉar 24 = 4*6 !

Konsideru N = 3276 : N enestas 6 unuoj, 7 dekoj, 2 centoj kaj 3 miloj : 3276 = 3*1000+2*100+7*10+6 ! Ni povas ankaŭ konsideri ke, en 3276, enestas 327 dekvaloroj, 32 centvaloroj kaj 3 milvaloroj. Ni skribos $N_0$ = 6, $N_1$ = 7, $N_2$ = 2, $N_3$ = 3, kaj ankaŭ $N_{10}$ = 327, $N_{100}$ = 32 kaj $N_{1000}$ = 3 !

Nun, ni volas solvi la jenan problemon : kiel trovi la divizorojn de iu nombro N ? Evidente tio ne estas bezonata se N estas primonombro (aŭ primo), ĉar se N estas prima, divizoroj estas nur N kaj 1 ! Ni notu ke la nombro 1 NE estas prima ! La unua primo estas 2 kaj ĝi estas la sola para primo.

Se N estas neprima, necesas uzi la divideblecajn kriteriojn aŭ almenaŭ klopodi dividi N per diversaj nombroj ! Se ni trovas unu faktoron A de N, ni povos daŭrigi kun N/A. 130 => 130/10 = 13 !

Ni unue notu, ke, kun ĉiu rezulto, ni povas rekomenci plurfoje la saman metodon ĝis obteno de pli malalta nombro. (Vidu poste por 2 kaj 3) ! Por la diversaj ĉi-subaj ekzemploj, ni nur konsideros triciferajn nombrojn ; do inter 100 kaj 999 !

En tiu kazo, ĉiuj primaj divizoroj povas esti NUR 1,3,5,7,11,13,17,19,23,29,31 ĉar 37*37 =1369 > 999.

Sed evidente, niaj kriterioj povos funkcii kun ĉiuj entjeroj. Kontrolu poste por la divizoroj de 176111. (Effektive la divizoroj de 176111 estas 13,19, 23 kaj 31 : 13*19*23*31 = 176111). Jen la kriterioj por la unuaj primnombroj ĝis 31 :

-2 2 divizoras nombron N se N estas para. Nombro estas para se la lasta cifero estas 0,2,4,6,8 ! Ankaŭ N/2 povus esti para, kaj tiel plu ! Ekzemple 512 havas plurfoje 2 kiel divizoro ! 512 => 512//2=256 =>256/2=128 =>128/2= 64=>64/2=32=>32/2=16=>16/2=8=>8/2=4=>4/2=2. (Efektive ; 512 = 2*2*2*2*2*2*2*2 = $2^8$) !

-3 3 divizoras N se la sumo de la ciferoj estas dividebla per 3. Denove estas eble daŭrigi la metodon ĝis atingo de 0, 3, 6 aŭ 9 ! Ekzemple : 843 kies cifera sumo estas 8+4+3 = 15, => 15 kies cifera sumo estas 1+5 = 6. Jes 3 divizoras 843. : 843 = 3*281 ! Kion Ni Devis Trovi [KNDT, CQFD en la franca ] 281 estas prima ĉar 17*17 = 289 > 281, kaj 281 ne estas dividebla per 2, 5, 7, 11, 13 < 17 !

-5 5 divizoras N se la lasta cifero estas 0 aŭ 5.

-7 7 divizoras N se ($N_{10}$ – 2*$N_0$) aŭ ($N_{10}$ + 5*$N_0$) estas

dividebla per 7. (2 metodoj !). Ni notu ke la du ciferoj 2 kaj 5 rezultigas 2 + 5 = 7 ! Povas esti interese koni la unuaj multiplkatoj de 7 ; 0, 7, 14, 21, 35, 42, 49, 56, 63, 70, 77,84,91,98. Ekz. : N = 504 : Do 50-2.4 = 42 => 4-2*2 = 0 kaj 50+5*4 = 70 => 7+5*0 = 7 ! [KNDT]. N = 609 => 60-2*9 = 42 => 4-2*2 = 0 ; N = 168 => 16-2*8 = 0 ; N = 847 => 84-14 = 70.

-11 11 divizoras N se la sumo de la ciferoj de rango para, minus la sumo de la ciferoj de rango nepara, en absoluta valoro (do pozitive), estas dividebla per 11. Ekzemple: Por N = 814 : 8+4 = 12 kaj 12-1 = 11 ! Por N = 1529 : (1+2)-(5+9) = 3-14 = -11 !

-13 13 divizoras N se ($N_{10}$ – 9*$N_0$) aŭ ($N_{10}$+ 4*$N_0$) estas dividebla per 13 Denove notu ke 9 + 4 = 13 ! Unuaj multiplikatoj de 13 estas 0, 13, 39, 52, 65, 78, 91. Por N = 169 : 16+ 4*9 = 52 => 5 +4*2 = 13 ! Por N = 91 : 9-9*1 = 0 ! ][KNDT] Ni notu por 176111 : 17611-9=17602 => 1760-18=1742 => 174-18=156 => 15+24=39

-17 17 divizoras N se ($N_{10}$ - 5*$N_0$) aŭ (N10 +12*N0) estas dividebla per 17 : (5 + 12 = 17). Unuaj multiplikatoj de 17 estas 0, 17,34,51, 68, 85. Ekzemple : Por N = 85 : 8-5.5 = -17 ; kaj 5+12-1 = 17 Por N = 612 => 61+8=63 => 5-5*1 = 0 kaj 61 +12.2 = 61 + 24 = 85. Ni notu, ke tio funkcias eĉ kiam la rezulto estas negativa ! Ni uzu tiam la absolutan valoron ! ($N_{10}$ - 5*$N_0$) N = 884 => 88-5*4 = 68 => 6-5*8 = -34 => 3-5*4 = 17 ($N_{10}$ +12*$N_0$) N = 561 => 56+12= 68 => 6-40 = 34 => 3-5*4 =-17

-19 19 divizoras N se ($N_{10}$ + 2*$N_1$) aŭ ($N_{10}$ - 17*$N_0$) estas dividebla per 19 : (2 + 17 =19-. Unuaj multiplikatoj de 19 estas 0, 19, 38, 57, 76, 95. ($N_{10}$ + 2*$N_1$) N = 133 => 13+2*3=19 ! N = 684 => 68+2*4 = 76 => 7+2*6 = 19 ! ($N_{10}$ - 17*$N_0$) N = 171 => 17-17 = 0. N = 551 => 55 -17 = 38 => 3+2*8 = 19. Ni notu por 176111 : 17611-17=17594 => 1759+2.4=1767 => 176+2.7 =190 => 19-0.17 = 19. Por tiu nombro, ni miksis la du metodojn laŭ la valoro de la lasta cifero.

-23 23 divizoras N se ($N_{10}$ + 7*$N_0$) aŭ ($N_{10}$ - 16*$N_0$) estas dividebla per 23. (7+16 = 23). Unuaj multiplikatoj de 23 : estas 0, 23, 46, 69, 92. N = 552 => 55+7*2 = 69 Sed prefereble 55 -16.2 = 55-32 = 23 ! Ni notu por 176111 : 17611+7=17618 => 1761+56=1817 => 181+49=230 => 23+0=2

-29 29 divizoras N se ($N_{10}$ + 3*$N_0$) aŭ ($N_{10}$ - 26*$N_0$) estas dividebla per 29. (3+26 = 29) Unuaj multiplikatoj de 29 estas 0, 29, 58, 87. N = 348 => 34+3*8 = 58 => 5+3*8 = 29. N = 551 => 55+3 = 58 => 5+3*8 = 29. N = 667 => 66-26.7 = 66-182 = -116 => 11+3.6 = 11 + 18 = 29. 751593 =>75159+3*3=75168 =>7516+3*8=7540 => 754+3*0=754 =>75+3*4=87 => 8+3*7=29 !KNDT]

-31 31 divizoras N se ($N_{10}$ - 3*$N_0$) aŭ ($N_{10}$ + 28*$N_0$) estas dividebla per 31 : (3+28 = 31). Unuaj multiplikatoj de 31 estas 0, 31, 62, 93. N = 155 => 15-3*5 = 0. N= 558 = 55-3*8 = 31. N = 651 => 65-3 = 62 => 6-23*2 = 0 651 => 65 + 28.1 = 93. Ni notu por 176111 : 17611-3=17608 => 1760-24=1736 => 173-18=155 => 15-15=0

*Claude GLADY*

# Espéranto en Flandre - actualités

# Novaĵoj pri la agado en Flandrio

**Mortis konata belga aŭtoro kaj vortaristo Petro Desmet'**

Lode Van de Velde kaj mi intense kunlaboris kun Petro en la lastaj jaroj. Antaŭ kelkaj jaroj, Petro petis nin helpi lin realigi dekon da gravaj eldonajn projektojn, por ke la multaj jaroj, kiujn li laboris pri ili, ne estu vanaj. Ĉiuj projektoj estis efektivigitaj; ekzemple temis pri Esprimaro, la vortaro Esperanto-nederlanda 'PIV-ido' kaj la Oklingva Proverbaro.

Esperantaj eldonaj projektoj estis (certe en la lastaj jaroj de sia vivo) por Petro ege gravaj. Dum la pandemio, estis tre malfacile por Flandra Esperanto-Federacio vendi Esperantajn librojn. Ne estis kunvenoj dum longa tempo, do neniu libroservo estis ofertita. Kiel alternativo, mi komencis intervjui homojn. Mi komencis kun Petro kaj finfine ĉefe filmi lin. Tio ja helpis iom pri vendo kaj nun estas ĉefe interesa kiel bildarkivo. Vidu: https://benelukso.eu/bitarkivo#Petro-filmetoj. En Vikipedio vi povas trovi pliajn informojn pri Petro. Lode kaj mi fakte ne bone konis Petron antaŭ 2018. S-ro Desmet' estis escepte inteligenta (kaj multflanka!) persono kaj tre bona Esperanto-instruisto. Dum la pluraj jaroj, kiam Lode kaj mi intense laboris kun li, ni lernis vere multon.

*Yves NEVELSTEEN*

### Centre d'archives à Diest

Diest disposera d'un centre d'archives entièrement dédié à l'espéranto. Marc Vanden Bempt et plusieurs autres passionés des langues y ont acheté un espace d'archives. Il y a de la place pour 15 000 livres, 10 000 magazines et autres objets de collection liés à l'espéranto.

Marc: « Une grande partie des archives était parvenue à la bibliothèque de Courtrai par l'intermédiaire d'un collectionneur. Il n'y aurait plus de place pour la collection d'espéranto dans le nouveau bâtiment de la bibliothèque. Et puis nous n'avons pas hésité un seul instant avec notre organisation à but non lucratif et nous avons pu héberger les archives chez quelqu'un, dans sa maison privée à Winksele. Il s'agissait bien sûr d'une solution temporaire. Nous avons maintenant trouvé un nouveau site à Diest. »

Source: VRT NWS https://mallonge.net/archive-diest

Vous voulez aider le centre d'archives financièrement ou en tant que volontaire ? Rendez-vous sur http://iespa.eu

# Musique en espéranto


# Dezertoj: La dua bitalbumo de Armel Amiot

La 24an de majo 2024, post dujara paŭzo, aperis nova albumeto de Armel Amiot kun la titolo Dezertoj. Ĝi esploras la miton de la dezerto, simbolo de soleco kaj forlaso. Ni eniras la dezerton, dum ĉio ĉirkaŭ ni senhomiĝas, pro manko de amo, amikeco, aŭ memfido. Ni eniras ĝin, jen per surprizo, jen per nia propra volo, aŭ eĉ per sortoturniĝo.

La ses kantoj de ĉi tiu albumeto venas duope, man-en-mane. Kiel jino kaj jango, aŭ la du flankoj de monero, ĉar hazardo akompanas kaj kolorigas ĉiujn niajn elektojn. Temas pri nur originalaj verkoj kun teksto kaj muziko verkitaj kaj komponitaj de Armel Amiot kun la lingva helpo de Liven Dek.

En ĉi tiu disko ni eniras la dezerton tra la pordego de Nek viro nek virino. Ni kredas, ke ĉio estas en ordo, ke ĉio iras bone... kaj tiam, sen kompreni kio okazas al ni, ni falas, ni ne plu estas multo. Nek viro nek virino.


Dezertoj aperas laŭ la kutimaj bitformatoj disponeblaj ĉe Vinilkosmo ĉi tie kaj elsendoflue en la kutimaj muzikplatformoj liveritaj de Vinilkosmo tra Believe.




*Fonto: https://sezonoj.ru/2024/05/muziko-50/*

# Mots croisés

# Krucvortenigmo



Elŝutu la solvon de la enigmo ĉi tie:
**https://mallonge.net/eem2024-2-solvo**

**Vertikale** 1. Distrikto eklezia 2. Povas esti 3. Trakti manĝaĵon 4. Esprimo de indiferenteco 6. Bedaŭra esprimo 7. Loĝi sur kampo 8. Speco de humuro 9. Valizo 10. Rando 15. Inversa, latina litero 19. Prepozicio anstataŭ akuzativo 21. Reagi al malbono 22. Ĝena flugbestet' 23. Ne povas esti negativa 24. Narkotaĵ' 25. Branka besto 26. Mallonga saluto 27. Unuo de rezistanco 32. Plaĉa 33. Kart-emblem' 35. Ne akcidenta 36. Konkluda esprimo 37. Haŭtkovraĵo ĉe iuj bestoj 38. Multobligi 39. Reklami 40. Landaro 45. Slavlingve 51. Rand'

**Horizontale** 1. Esprimo de malkontento 5. Malfekundigi 9. Sesedr' 11. Kredo 12. (√4)³ 13. Tenilo 14. Ne ĉi tie 16. Rara litero 17. Manĝebla molusko 18. Faligi en ĉiuj direktoj 20. Ovalaĵo 22. Obseda kutimo 25. Kernofendado 28. Suba vestaĵ' 29. Ne tuŝi la teron 30. 12a greka litero 31. Funkciigi 34. Tabuleto 38. Aŭtomarko 41. Ĉelo 42. 0,304 m 43. Elekta konjunkcio 44. Printempa renkontiĝo 46. Granda planto 47. Refleksiva pronomo 48. Loko por aĉeti alian valuton 50. Eniri alian staton 52. Inter ruĝa kaj flava 53. Supersigno

V.Esp-o dispose d'une bibliothèque de plus de 1700 livres à Cerfontaine. Elle est visitable sur rendez-vous chez le bibliothécaire Claude Glady.
Renseignements : cglady@arcadis.be

## Rencontres et cours réguliers :

**Charleroi - https://esperanto.be/charleroi**
Centre Culturel, rue du Château 3 - 6032 Mont-sur-Marchienne. Pour y participer: Michèle Villers michele.villers@hotmail.com

**Eghezée** Jean Annet - jean.annet@gmail.com
0495 10 32 30

**Huy** Philippe Draize - philippedraize@yahoo.fr

**Liège - https://esperanto.be/liege**
Eric Nemes - eric.nemes@gmail .com
0494 230 234

**Namur** Cours à l'UTAN tous les vendredis à 13h30. Jean Annet jean.annet@gmail.com

## Tables de conversation :

**Liège**
Chez « Toutes directions ». *Infos* : 04 262 20 64 - https://mallonge.net/td

**Louvain-la-Neuve**
Catherine Royaux cat.royaux@netcourrier.com

# Bonvenon al Lessines

## Zamenhof-festo 2024 en Lessines

Jam rezervu la daton! La venonta Zam-festo okazos la 14-an de decembro kaj estos vera Zam-Kulturtago. Post bonega manĝo ni vizitos la Hospitalon Notre-Dame à la Rose en Lessines. Fondita en 1242, la Hospitalo estas malofta kompleta ekzemplo de aŭtarkia hospitalejo de la Mezepoko.



## Autres personnes ressources

- Jeunes et initiation : Valère Doumont 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
- Cerfontaine : Claude Glady 071 64 49 16 cglady@arcadis.be
- Charleroi : Rudy Cogniaux 0492 710 974
- Comines-Warneton : Jean-Claude Thumerelle - jcthum@gmail.com
- Lobbes : Jean-Pol Sparenberg 0475 272 319 jpsparenberg@brutele.be
- Plombières : Bernadette Poncelet, bernadetteponcelet@skynet.be
- Verviers : Jean-Marie Jacques jeajacques@voo.be

**Voulez-vous apparaître dans cette liste ?
Contactez-nous !**

# L'espéranto c'est dans la poche

Découvrez une langue en une semaine



Cette brochure est une bonne base pour commencer à apprendre l'espéranto. Cette langue internationale s'apprend plus facilement que les autres du fait de sa grammaire logique et de son système pratique de construction des mots.

Découvrez d'abord l'espéranto dans la première partie et faites ensuite les exercices de la deuxième partie. À chaque leçon de grammaire correspond un exercice. À raison d'une leçon par jour, vous pourrez au bout d'une semaine comprendre un texte simple et faire quelques phrases.




**Recevez cette brochure gratuitement !**
**- via notre site : esperanto-wallonie.be**
**- communiquez votre adresse à esperanto.wallonie@gmail.com**
**- envoyez vos coordonnées par sms au n° de tél : 0485 51 75 52**

BELGIE(N) - BELGIQUE
PB-PP
bpost

P001014
Lobbes
6540-dépôt

Editeur responsable: Jean ANNET
V. Esp-o : rue de la Terre Franche, 31 - 5310 Longchamps
Exp : Jean-Pol Sparenberg
Ruelle de Thuin, 20 - 6540 Lobbes